Universala Esperanto-Asocio
ZAMENHOFA FESTADO
Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-01sendita el Budapeŝto, la 23an de januaro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Zamenhofa Tago en Varsovio

Provizora programo de la solenado okaze de 100-a morto-datreveno de Ludoviko Zamenhof:




**Esperanto restas tre videbla en la pola ĉefurbo. Mem malkovru tion!**

**2017-04-28 vendredo**

10:00 - Registrado de partoprenantoj
11:00 - Solena malfermo de la Konferenco
11:40 - Ludoviko Zamenhof - biografia trajto
12:30 - Prelegoj kaj paroladoj
14:00 - Malfermo de la ekspozicio
16:00 - Distra vespero: solistoj, teatraĵo, koncerto

**2017-04-29 sabato**

10:00 - Promenado tra kvartalo Muranow laŭ spuroj de Ludoviko Zamenhof
11:30 - POLIN Muzeo pri Historio de Polaj Judoj (ĉ. 3 horoj)
16:00 - Sankta Meso en Esperanto
17:30 - Prelegoj
18:30 - Distra Vespero: solistoj, kant-muzikgrupo

**2017-04-30 dimanĉo**

9:00 - Solena Ceremonio ĉe la tombo de L. L. Z.
- vizitado de tomboj de Klara, Rozalia, Marek, Feliks, Leon…

11:00 - Muzeo de Varsovia Ribelo 1944
15:00 - Konkludoj/Fermo de la Konferenco
16:00 - Promenado tra la Malnova Urbo – adiaŭo de Varsovio



Solenaĵo okazos en Berlino en la 21a aprilo kaj en Bjalistoko laŭraporte en la 14a de aprilo.

Invito al la solenaĵoj en Varsovio aperos en la februara numero de la revuo Esperanto.

**Pliaj informoj: prezidantino de la Varsovia** filio de PEA**: Alina Mozer: alwamo<ĉe>wp.pl**

## Aktivula Maturigo (AMO) ĝis julio

Jen la listo de AMO-seminarioj ĝis julio. Petoj por seminarioj post julio alvenu ĝis la 31a de marto

**AMO 30 Munkeno,** Germanio, marto 25 – aprilo 2

**AMO 31 Kutaisi, Kartvelio,** aprilo 1-3 kadre de la 10a MK

**AMO 32 Castione della Presolana,** Italio, kadre de IJF.

**AMO 33 Greziljono**, Francio, aprilo 14-20

**AMO 34 Vroclavo**, Pollando, majo 18-20 kadre de la Interkultura Majrenkontiĝo.

**AMO 35 Les Brenets**, Svislando, majo 25-28. AMO-LIMA. Lime al Francio.




**AMO 36 Soriso**, Brazilo, junio 15-18 kadre de naciaj kongresoj (konfirmota).

**AMO 37 Raleigh** (NC), Usono, julio 5-12 kadre de NASK (konfirmota).

**AMO 38 Busano**, Koreio, julio 15-22 kadre de la 50a Kongreso de ILEI.

Pli detala prezento de tiuj seminarioj, kun temoj kaj gvidantoj, aperos en la februara revuo.

## MONA konsisto

La estraro en sia hieraŭa skajpkunsido aprobis la konsiston de kelkaj komisionoj. Jen la ampleksigita konsisto de la komisiono pri la regiono Mez-Oriento kaj Nord-Afriko (MONA)

Renato Corsetti, kunordiganto, Annie Grente, Maroko, Ahmed Belmiloud, Alĝerio, Dorota Parzyszek, Tunizio, Latif alSharif, Sirio, Taled Orabi, Sirio, Ahmad Lateef, Egiptio, Park Chung Kil, Kuvajto, Vasil Kadifeli, Turkio, Murat Özdizdar, Turkio, Nana Ĥizambareli, Kartvelio, Gayane Abrahamyan, Armenio, kaj Stefan MacGill, kun respondeco en la estraro de UEA por MONA.

## La revuo *Esperanto*

Stato je la 23a de januaro. La novembra, decembra kaj januara numeroj troviĝas en la Centra Oficejo pretaj por enpresejigo kaj unu tagon poste, la reta aperigo. La februara numero estas praktike fermita kaj aktive preparata – ĉeftemo estos la 102a UK La limdato por la marta numero estas la 10a de februaro.

V = 415

=====================================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.